



44a jaro. Nro 100a. 2a semestro 2017

VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**58-a Argentina
Kongreso de Esperanto**

**100-a Eldono de
Venezuela Stelo**

Enhavtabelo

Noticias en español 3

Venezuela Stelo atingis 100-an eldonon!
Ricardo Coutinho 4

Nuestra revista alcanzó su edición número 100
Ricardo Coutinho 5

Mia lingva aventuro
Daniel Jesús Araque Acosta 7

Vojaĝo al Kostariko
Liba Gabalda 8

La 58-a Argentina Kongreso de Esperanto
Ricardo Coutinho 10

Konkurso Teo kaj amo
Andrea Araque 12

La brila ŝtono
Isaac Santiago 13

Sen eliro
Alicia Chilifoni 16

Ne diru
Carlos David Alvarez Pérez 16

Monologo
Samuel Rondón 17

Directorio de Asociaciones en América 18

Esperanto: Movimiento internacional 19

■ Esperanto ■ Español ■ Bilingüe



Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net



**Venezuela Esperanto-Asocio membriĝis
al UEA ekde 1978.**

Estraro:

Prezidanto
Elizabeth Miranda

Vic-Prezidanto
Nancy Aquino

Ĝenerala Sekretario
Juan Miranda

Kasistino
Elsa Angulo

Aldelegito pri Publikigado
Isaac Santiago

Aldelegito pri Edukado
Ricardo Coutinho

Grafikisto kaj kunredaktisto
Isaac Santiago

Ĉefredaktisto
Ricardo Coutinho

¿Quieres saber más sobre el Esperanto?

El Esperanto es un idioma planificado, creado en 1887 para servir como idioma neutral internacional. Su gramática sencilla facilita su dominio rápido. Su flexibilidad lo convierte en una lengua ideal para la traducción y la creación literaria. Si quieres saber más sobre este idioma fascinante, escribe o dirígete a la **Asociación Venezolana de Esperanto**.

Venezuela Stelo es el órgano difusor oficial de la **Asociación Venezolana de Esperanto**. Esta revista está escrita en Esperanto, conteniendo artículos de interés nacional e internacional.

Para saber más visita: <https://esperantovenezuela.weebly.com/> www.esperanto-venezuela.org
Y también el Directorio en las páginas 18 y 19 de este número.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.

Noticias en español



El curso de Esperanto en Duolingo para angloparlantes superó el millón de estudiantes. Este curso que apareció en 2015 se encuentra ya entre los 20 primeros para hablantes del inglés. La versión en español apareció en el 2016 y tiene más de 300.000 estudiantes. Proximamente estará disponible para hablantes de portugués.

www.duolingo.com/

Sudoku Esperanto N° 0009

								4
7	6	8						2
5				4	8	7	6	
a		5					3	2
b			5	6				8
c			2					
8	3		4					
4	5	9	2	8	6			
6	2		3	4				

Decifru la enigmon!

- 1- solvu la sudokon.
- 2- trovu la kaŝitajn literojn.
- 3- decifru la mesaĝon.
- 4- sendu la kaŝitan mesaĝon al sudokoesperanto@gmail.com

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
a	a	s	e	i	l	f	n	ĉ	e
b	a	p	e	r	a	t	n	i	n
c	i	o	a	n	g	o	b	r	t

En octubre 2017 apareció el juego Sudoku Esperanto, que combina el clásico juego sudoku con un mensaje en Esperanto oculto. Se publica el nombre de los ganadores, han participado jugadores de 15 países.

www.facebook.com/sudokoesperanto/



9-a Tut-Amerika Kongreso

Esperanto

Havano, Kubo

11-17 februaro 2018

Del 11 al 17 de febrero 2018 se desarrolló el 9° Congreso de Esperanto de las américas (TAKE) en la Habana Cuba. Participaron 240 personas de 20 países de América, Europa y Asia. Se realizaron conferencias, cursos, exámenes, paseos, conciertos, presentación de películas y más.

<http://www.esperanto.cult.cu/index.php/9-a-take>


Venezuela Stelo atingis 100-an eldonon!

Ricardo Coutinho

Nia landa revuo atingis 100-an eldonon! Nia unua eldono aperis en julio 1973, niaj ĉefartikoloj estis la forpaso de Benito Losada Azocar, fondinto de Venezuela EsperantoAsocio kaj la traslokiĝo de nia ĉiama amata samideano Juan Eduardo Bachrich al Karakaso. Ekde tiam, la asocio re-aktiviĝis kune kun la helpo de Linos Moulines, la fratoj Mosonyi, Agnes Tonai de Wallman, Octavio de Diego, frato de Fernando de Diego kaj nia unua ĉef-redaktoro, Felix Garcia Blazquez. En la 24-a eldono de nia revuo aperis redakcia komisiono, kiu partoprenis: Jorge Carlos Mosonyi, Liba kaj Floreal Gabalda, Raymonde Clarac, Rafael Mejías kaj Andres Turrisi. En tiu periodo aperis la unuaj raportoj de naciaj kongresoj, raportoj pri la agado de niaj lokaj grupoj en Valencio kaj Zulio, kiel kompreneble en Karakaso. Antaŭ la aktiveco de la geparo Gabalda kaj la instruisto Rafael Mejias, fariĝis ke la revuo kaj la landa asocio estis bela panoramo de juneco. Aldone tio, la eldono de Doña Barba tradukita de Fernando De Diego estis grava elmonstro por la internacia movado. Jam en la 45-a eldono la redakcia komisiono apenaŭ estis Juan E. Bachrich, Jorge C. Mosonyi kaj Andres Turrisi.


Jam en la 78-a eldono la redakcio kaj desegno estis kontrolitaj de Ricardo Coutinho. Kaj en la 84-a eldono de la revuo la desegno kaj grafikado estis kontrolita de Ramon Morales Castel, pere de tio ĝi ŝanĝiĝis al diverskolora kaj cifiregita revuo, ĉar la presokostoj por kolora eldono estis tro granda por la Asocio. Menciindas ke en la jaro 2009 aperis la "Eta Selektajo de Verkoj de Simon Bolivar", grava laboro de traduko de niaj samideanoj Andres Turrisi, Esteban Emilio Mosonyi kaj Jorge Carlos Mosonyi.

Kaj en la 96-a eldono Isaac Santiago el Merido fariĝis desegnisto kaj ankaŭ kunkontrolisto de la revuo kune kun Ricardo Coutinho.



1-a eldono de Venezuela Stelo, 1973

24-a eldono de Venezuela Stelo, 1981



En nia revuo aperis tradukoj de indiĝenaj rakontoj, traduko de poemoj de Antonio Crema, Miguel Otero Silva, Andrés Bello kaj de aliaj verkistoj, same aperis gravaj artikoloj de prezidantoj de UEA, membroj de la Akademio de Esperanto kaj aliaj gravaj aktivuloj de nia movado, same kiel naciaj kontribuajoj estis ĉiam grava kaj ofta ero de nia informilo, ne estas forgesebla la raportoj de Liba kaj Floreal Gabalda pri internaciaj eventoj, ili ĉiam aperas en nia retpoŝto, ĉiam ili estas bela spegulo de nia movado.



Ricardo Coutinho

Nuestra revista alcanzó su edición número 100

Ricardo Coutinho



81° Número de
Venezuela Stele,
2008



88° Número de
Venezuela Stele,
2011

¡Nuestra revista alcanzó edición número 100! Desde julio de 1973 la revista Venezuela Stele ha procurado informar, tanto a nivel nacional como internacional sobre las actividades y avances realizados en nuestro país sobre la difusión y promoción del idioma internacional Esperanto, además de esta labor nos interesamos en mostrar todas aquellas obras culturales, ya sea, de lo estrictamente literario hasta lo eminentemente folclórico de nuestro país en el mundo, utilizando el Esperanto como herramienta.

Nuestro primer editor fue el ingeniero Félix García Blásquez, oriundo de argentina, pero activista del idioma desde la mitad del siglo XX, fanático de los temas gramaticales, nos regaló bastantes interpretaciones y aclaratorias sobre el uso del idioma Esperanto y también del español.

La primera edición de la revista contenía como principales temas: fallecimiento del fundador de la Asociación Venezolana de Esperanto, Benito Losada Azócar, conocido en el círculo literario como Paco Trillero, era maestro en Maturín y funda la institución con dicha ciudad en 1912. La otra noticia es el traslado de Juan Eduardo Bachrich de Valencia a Caracas, eso trajo consigo la reactivación de la asociación siendo así el factor unificador de todos los esperantistas de Caracas. Muchos de ellos exiliados de la Segunda Guerra Mundial, el mismo Bachrich era oriundo de Austria, vivió en Yugoslavia.

Para la edición número 24, la comisión editorial estaría conformada por, el profesor y lingüista Jorge Carlos Mosonyi, venezolano pero de origen húngaro, era especialista en idiomas indígenas, muy interesado, igual que su hermano, Esteban Emilio Mosonyi, en el rescate de los idiomas indoamericanos,

Andrés Turrisi; electricista de origen italiano, interesado en traducciones y obras originalmente escritas en Esperanto, se dedicó al Esperanto desde muy joven. Floreal y Liba Gabalda, esperantistas muy activos a nivel internacional, Floreal es ingeniero civil, estuvo trabajando en la construcción del Metro de Caracas, primera línea, Liba es checa, conoció a Floreal en un congreso internacional de jóvenes esperantistas, nace su primera hija, Belonia en nuestro país, después de una década de trabajo con nosotros se regresan a vivir a Francia. Rafael Mejías, colombiano de nacimiento, activista importante, su profesor de Esperanto en varias zonas del país, junto con las hermanas Raymonde y Brigitte Clarac fueron promotores de excursiones y eventos en nuestro país, no en balde el primer encuentro de Esperanto en Venezuela se realizó en esa década, en el mismo participó y tocó el maestro guitarrista Antonio Lauro. En este periodo se crea la creación de la Asociación Zuliana de Esperanto, asimismo, en Barquisimó, Valencia y Maracay.

En Venezuela Stelo aparecieron traducciones cuentos indígenas, poemas de Miguel Otero Silva, Antonio Crema, Andrés Bello y otros importantes escritores, nacionales e internacionales. También aparecieron artículos de la más diversa gama; sobre historia, gramática, geografía.

Para la edición 84 se unió a nuestro equipo, el diseñador Ramón Eduardo Morales Castel, oriundo de Maturín, amante de las lenguas, con el la revista pasa de tener un diseño amateur a tener un diseño profesional, entre los cambios; la revista pasa de blanco y negro a color, éste cambio causó que la misma se publicara solo de manera digital porque los costos en papel era cuatro veces mayor al presupuesto anual de la institución, además en consonancia con el respeto al ambiente, esa medida fue respaldada por los asociados.

Para la edición 96, el merideño y activista esperantista desde hace años, Isaac Santiago Molina, reemplaza a Ramón Morales en el diseño de la revista, respetando el concepto que Morales había pensado para nuestra revista digital.

Espero que éste recuento haya sido enriquecedor, esperamos seguir siendo una guía para todo el movimiento nacional, así como referencia de nuestro país en el mundo.

¡Viva Venezuela!

 Ricardo Coutinho




90° Número de Venezuela Stelo, 2012



96° Número de Venezuela Stelo, 2015



96° Número de Venezuela Stelo, 2015



97° Número de Venezuela Stelo, 2016

Mia lingva aventuro

Daniel Jesús Araque Acosta

Mia nomo estas Daniel kaj mi naskiĝis en la ŝtato Yaracuy [ja.ra'kuj] de Venezuelo lokita en la Regiono Centrokcidenta en la centro-nordo de la lando. Mi estas medicin-studento kaj aĝas 22 jarojn, kiel la plimulto de la venezuela loĝantaro mi kreskis en unulingva familio, kaj fiaskis en la liceo kun la lernado de la angla lingvo. Ĉu estas neebila afero por ni venezolanoj lerni iun novan lingvon? Mi pripensis tiun demandon multfoje dum la jaro 2016, tiam mi ekserĉis surinterrete la plej facilan lingvon el la tuta mondo, kaj trovis milojn da naciaj lingvoj tiuj, kiuj estas parolataj. Mi reserĉis en tiu listo la plej gravajn naciajn lingvojn por eklerni iun el ili, sed bedaŭrinde mi pensis ke tiu tasko daŭrus kaj necesus kelkajn jarojn da lernado. Do, Mi diris al mi mem: "tio ne estas por vi, vi ne havas talenton por lingvoj"

Poste, dum kelkaj tagoj mi serĉis en Vikipedio la plej famajn kuracistojn de la homa historio, nur pro scivolemo ĉar estas interese por mi koni "famajn homojn", oni povas lerni multe de ili, pri iliaj eraroj kaj iliaj sukcesoj. Jam vi povas imagi kiun faman kuraciston mi trovis. La iniciatoro de la Internacia Lingvo surprizis min ĉar, kiel sola viro povas krei ilon por rompi la murojn inter la popoloj? Nekredeblan kaj admirandan laboron li faris. Sed bedaŭrinde tiu interesa kreaĵo ankoraŭ ne tute motivigis min, ĉar inter la universitataj lecionoj kaj la ekzamenoj mi ne volis malŝpari mian tempon... Do, mi daŭrigis la legadon pri Esperanto kaj trovis kelkajn esperantajn esplorojn kie la lingvistoj parolis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, tio estis la pinto por ke mi eklernu ĝin. Mi ne malŝparus mian tempon, fakte. Mi provus ĉu mi povas regi fremdan lingvon aŭ ne. Do, dum la monato Decembro mi ekuzis la Kurson ĉe Duolingo kaj eklegis kelkajn lernolibrojn... Ĉu ĝi vere estas facile lernebla? Ĉu jes aŭ ne? Laŭ mia vidpunkto kaj laŭ mia eta sperto kun la lingvo, la respondo estas Jes, ĉar kiel hispanparolantoj, ni ne trovas multajn obstaklojn por superi, eble manko da tempo kaj la ĝusta uzado de la akuzativo.



Nun, mi jam havas pli ol duonjaron lernante la lingvon kaj ja mi povas uzi ĝin en konversacioj kun malsamlingvanoj aŭ disvastigi mian opinion surinterrete. Alia rimarkinda afero estas ke mi ricevis multe da helpo de Esperantistoj el la tuta mondo. Jes ja, oni povas trovi eo-spertulojn tiujn, kiuj amike helpas vin por plialtigi vian lingvonivelon.

Kie mi trovis ilin?

Ene de la retpaĝo: <http://edukado.net/>

Tie ili kreis novan programon nomata EKPAROLU <http://edukado.net/ekparolu>

Kies baza ideo estas ke: la speciale trejnitaj esperantistoj kaj la komencintoj trovu unu la aliajn kaj povi havi skajpajn parolsesiojn. Tiumaniere Ili donas la eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon.

Mi multe lernis kun ili, kaj mi kore dankas pro sia admirinda laboro.

Ili komfortigis mian lingvan aventuron.



Vojaĝo al Kostariko

Liba Gabalda

Meze de decembro 2017 ni vojaĝis al Kostariko, kie ni pasigis unu monaton vizitante diversajn lokojn de la bela lando. Ĉi foje ne temis pri iu Esperanto-evento, nia deziro estis koni tiun misteran landon plenan de ekzotikaĵoj.

Kostariko, laŭ la traduko "Riĉa Marbordo" estas vere admirinda lando situanta en Meza Ameriko. Norde ĝi limas kun Nikaragvo kaj sude kun Panamo. Okcidente ĝiajn bordojn banas Pacifika oceano kaj oriente Karaiba maro. Ĝi kuŝas en tropika regiono. La medio rememorigis al ni Venezuelon, kie ni loĝis dum ses jaroj kun la diferenco pri pureco favore al Kostariko. Registaro kaj la popolo tre zorgemas pri ekosistemo. La lando apartenas al la plej disvolvitaj demokratioj en la mondo. Ĝi fariĝis la unua lando de la mondo, kiu nuligis armeon fine de la jaro 1948.

Vasta natura riĉeco karakteriziĝas per virga pejzaĝo, koloraj sablaj plaĝoj bordurita per palmoj, nebulaj praarbaroj, densaj ĝangaloj kaj bunta flaŭro kaj faŭno. Oni povas diri, ke ĝi estas paradizo sur la tero. Sur la teritorio de la lando troviĝas kelkdekoj da naciaj parkoj, multaj protektitaj lokoj, naturaj rezervejoj kaj ne mankas amaso da vulkanoj, sennombraj akvofaloj kaj kelkaj varmaj fontoj. La lando kuŝas en tektona zono, kie de tempo al tempo okazas tertremoj. En oceano danĝeras fortaj kontraŭfluo pri kiuj la vizitantoj estas avertitaj.

Kostariko havas proksimume kvin milionojn da loĝantoj. La plej multo troviĝas en la ĉefurbo *San José* (Sankta Jozefo) kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Krom kelkaj koloniaj domoj, muzeoj, parkoj, placoj kaj Nacia teatro nenio tro alloga troviĝas en la metropolo. Vizitanton povas interesi bazaro kaj zoologia ĝardeno.

Oficiala lingvo estas la hispana, sed eblas interkompreniĝi per la angla kaj foje ankaŭ per la franca. Ofte mi devis diri hispane: "Kial vi alparolas min angle, se mi ne komprenas vin"? Lokanoj nomas sin "Tico" kaj ofte uzas formulon "Pura vida", kio povas signifi: "ĝoja vivo", "bonega vivo" aŭ simple "nur vivo".

Kostarikanoj etas tre ĝentilaj, amikemaj kaj helpemaj. Se oni parolas hispane ili tuj konversacias kaj tiamaniere oni ricevas multajn informojn. Interesa rimarko estas, ke libere promenantaj hundoj estas tre mildaj kaj tute ne agresemaj. Ili bojas nur inter si kaj eventuale postkuras motorciklojn.




Stabila politika kaj ekonomia prospero altiras plurajn eksterlandanojn instaliĝi en la lando. Elstaras italaj kaj svisaj komunumoj. Ekzistas ankaŭ aliaj latinamerikaj grupoj. La sukceso en ekonomio kuŝas en ĉiam disvolviĝanta turismo, eksporto de elektronikaĵoj, produktado kaj eksportado de kafo, sukero, ĉokolado, bananoj, kaj aliaj tropikaj fruktoj. La kostarika kaŭprodukto estas tre altkvalita. Ekzistas vastaj banan-, ananas- kaj sukerkanplantejoj. Ne mankas papajaj kaj mangaj plantoj kaj arboj, kokos-palmoj. Tradicia produkto estas pentritaj ĉaretoj kaj skulptitaj maskoj el balzo. Ĝi estas la plej malpeza lignaĵo.

Rilate la trafikon la plej konvena estas aŭtomobilo. Per busoj eblas ankaŭ facile vojaĝi al diversaj interesaj lokoj. Vojoj ne estas ĉie bone prizorgataj. Ili estas polvaj kaj foje malfacile traireblaj. Por transportado ne mankas aviadil- kaj ŝip-rimedoj. Proksime al strandoj oni ŝatas uzi kvarciklojn kaj sur la plaĝoj promenantoj povas ĝui ĉevalrajdadon.

Ni traveturis Kostarikon de la nordo al la sudo ĝis la limo kun Panamo. Dum nia restado ni vizitis du esperantistojn kun kiuj ni pasigis tre agrablajn tagojn. Ambaŭ rakontis pri siaj inĝenieraj studoj en Moskvo kaj ĝis nun ili scipovas paroli la rusan lingvon. Krom ili ceteraj homoj ne scias pri Esperanto. Do, mi kun plezuro donis informojn pri ĝi, eble ekĝermos intereso. Plurfoje ni renkontis indiĝenojn kaj en la vilaĝo *Boruca* ni spertis tritagan festadon de la nova jaro. Longe ni memoros pri belaj travivaĵoj kaj neforgeseblaj momentoj, kiujn mi eternigis sur fotoj... la rezulto aperas en la aldona fotaro.



Liba Gabalda



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

La 58-a Argentina Kongreso de Esperanto

Ricardo Coutinho

La 58-a Argentina Kongreso de Esperanto. Krespo, 14^a ĝis la 16^a de oktobro 2018.

La evento estis organizita en la Komerca Domo de Krespo, kie funkcias lernejo kaj la Asocio de Ŝako kaj Esperanto. La plimulto de la loĝantaro de Krespo (Crespo) estas pranepoj de germanoj kaj italoj, ĝi estas trankvila kaj bela urbo de la provinco Entre Rios. La aranĝo estis gvidita de la Argentina Esperanto-Ligo kaj dankon al Gabriel Wagner kaj lia edzino, kiel loka komitato, Rubén Sanchez kaj lia edzino, kiel membroj naciaj de la Ligo, la komunumo de Krespo, kiu afable kaj sindediĉe helpis nin.

La ĉefa temo estis: Ludu kaj Lenu. Fakte Gabriel Wagner prelegis pri kiel oni povas uzi kantojn kaj ludojn por la bona kaj vigla lernado de Esperanto. Ankaŭ Adian Alejandro parolis pri la fama ludo Risko, Ricardo Coutinho parolis pri la ludo Kranio. Daniel Cotarelo parolis pri Esperanto kaj Interreto; tio estas, pri vikipedio, fejsbuko kaj aliaj aplikaĵoj. Silvia Rottenberg parolis pri la judoj mesianismaj, laŭ ŝia propra sperto. Rubén Sanchez pri novaj kaj malnovaj simboloj. Adrian Alejandro ankaŭ parolis pri TEJO kaj Alkaido.

Ankaŭ okazis la AEL-Asembleo, partoprenis membroj de tiu organizaĵo kaj la plimultoj de la ceteraj aliĝintoj de la kongreso. Nur unu listo por la estrarorenovigo estis prezentita; Adian Alejandro, kiel prezidanto, sekretario Rubén Sánchez, kasisto Gabriel Wagner, delegito de la rondo de Neŭkeno estas Mariela, edzino de Rubén Sánchez, la ceteraj rondoj tra la lando ne prezentis iliajn reprezentantojn. Malgraŭ ke aperis pluraj loĝantoj de Bonaero, ili ne konsciis ke ili mem povis organizi rondon por la estrarorenovigo. Ankaŭ estis elektita Mirta Salvatierra, lernantino de Rubén Sánchez kiel administra kontrolisto. Tiu formalajo estis tre ne-formala, tia kia ofte okazas en e-eventoj kie la etoso estas de personoj kiuj interrilatas dum jardekoj.



Partoprenantoj de la 58-a Argentina Kongreso de Esperanto



Prelego pri la ludo Kranio



Loka klasika muzikteamo ludis ĉe ni belajn, famajn kaj aliajn propre verkitajn melodiojn. Ankaŭ okazis festeno kaj flagokuko kiun Silvia Rottemberg mem sur ĝi fajrigis la kandelon. Estis ankaŭ prezentita bela kaj grandega kolekto de libroj donacitaj de Antonio Rampulla, esperantisto de Kordobo (Argentino) al la Krespa Ŝako-Esperanto-Asocio.

Ne estas forgesblaj la promenado ĉe la bordo de la rivero Paranao kaj la bela kaj granda skulptaĵo Jesuo Fiŝkaptisto, la flago-marŝo tra urbo Krespo, la restoracioj, la intervjuoj de loka ĵurnalo kaj la intervjuo de la loka televido. Oni devas menciigi ke la sinjorino Wagner sorĉis nin per siaj belaj kantoj kaj gitarludado, estis ankaŭ ĝuinda la danco de Silvia Rottemberg, Mariano Street, Mariela Kaj Rubén Sánchez.

Mi ankaŭ dankas la gastemon de la hotelo Crespo kaj hotelo Garten, ankaŭ de la afableco kaj vigleco de ĉiuj la partoprenantoj de la kongreso, speciale de la lernantoj kiuj, malgraŭ la malfacilecoj, zorgis sekvi niajn prelegojn. Entute partprenis 21 personoj de la provincoj de Neŭkeno, Bonaero, Entre Rios kaj Rio Negro.

La 59^a Argentina Esperanto-Kongreso okazos en Monte Hermoso ĉe la suda marbordo de la provinco de Bonaero dum la sankta semajno (fino de marto kaj komenco de aprilo).



Ricardo Coutinho



Prelego pri la judoj mesianismaj



Konkurso Teo kaj Amo

Andrea Araque

El 79 filmoj de 27 landoj, nia filmeto "Malgranda Miraklo" estis ŝatata de la estraro de la faka konkursokomitato kaj estis premiita kiel "Indikitaj filmetoj por la premio Plej bona scenaristo" kaj "Indikitaj filmetoj por la premio Plej bona originala muziko".

Mi ekkonis tiun konkurson dum mia partopreno en la 100-a UK, kiu okazis en Lillo, Francio, en la jaro 2015. La prezentado de la filmkonkuro "Teo kaj Amo" estis reklamita en la programero de la kongreso, do, kun iom da kuriozeco mi volis scii pri kio ĝi temis. Dum la filmoprezentado, mi spektis la gajnintajn mallongajn filmojn de la 1-a konkurso, ĉiuj estis diversaj, sen limoj pri deveno, aĝo aŭ stilo. Mi vere ĝuis la etoson de la okazigo, kaj la emociojn kiujn mi sentis spektante ilin. Tiel la ideo konkeris min.

Kun nula sperto en produktado de filmoj sed kun apogo de familianoj kaj amikoj, mi kuraĝis kaj decidis partopreni en la 2-a konkurso de "Teo kaj Amo" por la jaroj 2016- 2017. Post interparoli kun amikino, la temo de nia filmeto estis klara, ni ligos Teon + Amon al la proksimulo, bazita en la nuntempa ekonomika krizo en Venezuelo. Certe tiu rakonto estos tre bone konata, inkluzive vivata de multaj venezuelanoj.

La filmeto temas pri virino kiu malsaniĝas, kaj ne trovas la medikamentojn kiujn receptis la kuracisto. Post tagoj, kun daŭra malbona sano, enlitiĝita en ŝia sola hejmo, du infanojn kiuj ludis proksime, vidis ŝin malsana. Post mallonga babilado, ili preĝis por ŝi. Tiuj infanoj lernis de ilia avo la sanigajn kvalitojn de la plantoj, eĉ li preparis teon por ili por montri la graveco de la plantoj. Do, tiuj ideoj estis en iliaj pensoj dum ili ĝojis kolorigante desegnon kun la mesaĝon "amu al via proksimulo kiel vi mem", tiam ili havis ideon: prepari dum kelkaj tagoj, teon por helpi la virinon trovi sanon.

Por rimarki la ĉefa ideon de la filmeto, teo + amo al la proksimulo, mi devis elekti muzikon kiun bone kaptu la temon. Post daŭre serĉi ĉe jutubo, kaj kun helpo de amikino, ni elektis la kanton "Malgranda Miraklo", de Ĵomart kaj Nataŝa. Bazita en la rakonto, la infanoj faris malgrandan miraklon, ili, kun teo kaj amo, helpis virinon por saniĝi sen helpo de la tradiciaj medikamentoj.

Do, rapide, mi skribis al Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj permesis min uzi ilian kanton por la filmeto, tio tro ĝojigis min ankaŭ ĉar al mi tro plaĉas kiel ili kantas.


La filmo estis realigita en Merido, ni elektis diversajn escenejojn tra la urbo. La unua estis en vera vico por aĉeti rizon, kie la aktorino svenis, kaj la personoj kiuj estis en la vico helpis ŝin, eĉ oni demandis al mi iom furioza, kiu mi estis kaj kial mi havis kameraon tie, ŝajne, iuj ne volis ke oni montru la veran krizon. Poste, ni ricevis helpon de la kuracisto de la Hospitalo "El Llano" kiu volonte, akceptis aperi en la filmo priatentante nian malsanulino. Ankaŭ, ni filmis en diversaj apotekoj de la urbo demandante pri la medikamentoj receptitaj (kiuj kompreneble, ne estis). Finfine, la hejmo de la virino estis lokita en tre bela urbo parto, kiu aspektas kiu kamparo. Tie oni povas vidi la plej grandajn montojn de Merido, kaj la elektita domo por la filmo havas belan ĝardenon kun multaj plantoj. Do, ni volis montri tra la escenejoj, la belecon de Venezuelo kaj ankaŭ la krizon kiun vivas la lando.

Publike mi volas danki al ĉiuj kiuj apogis kaj helpis tiun filmeton, al ĉiuj kiuj laboras por la filmokonkurso Teo kaj Amo, kaj al Dio, la fonto de kuraĝo, kiu dum la plej malbonaj situacioj neniam lasas nin sola, la plej bona ekzemplo de amo al la proksimulo, la kreinto de la naturo kie ni povas trovi multajn solvojn por saniĝi.

 Andrea Araque

Vi povas spekti la filmon ĉi tie:

<https://www.youtube.com/watch?v=3eB8rGAWrOM>



La brila ŝtono

Isaac Santiago

La piedra luminosa

En un viejo camino entre los estados Mérida y Barinas, estaba la humilde casa de la señora Rosa, viuda, ya entrada en años y sin haber procreado familia. Su humilde vivienda era una parada obligatoria para arrieros y viajeros que transitaban aquel camino solitario, estrecho y bordeado de precipicios. Con la venta de comida a los viajeros y de pasto para las bestias, lograba llevar a duras penas su vejez.

La vivienda tenía un amplio corredor donde se amontonaban los bultos de mercancías, descargados de las mulas para pasar la noche después de una fatigante jornada. En diferentes claraboyas colgaban los arrieros sus hamacas y entablaban largas pláticas hasta que caían rendidos por el cansancio y el sueño.

Entre el corredor y el camino había un muro de cal y canto, sobre el cual doña Rosa había colocado una extraña piedra del tamaño de un balón de fútbol, pero con una concavidad muy pronunciada, utilizada para depositar suficiente agua para que las gallinas subieran a beber.

Cada persona que pernoctaba en la casa o pasaba por el camino enseguida que miraba la piedra le causaba admiración y curiosidad. Se la pedían a doña Rosa para llevársela o, inclusive, le ofrecían una determinada cantidad de dinero para quedarse con ella. Pero, la respuesta siempre era la misma: "esa piedra no la regalo ni la vendo."

Sobre su origen contaba que, después que se bajó un gran barranco cerca de su casa, durante una torrencial lluvia, pudo ver que la misma sobresalía entre las demás piedras y la arena blanca desprendida, le gustó tanto que se la llevó para su casa, aunque con gran dificultad.

La brila ŝtono

En malnova vojo inter la provincoj de Merido kaj Barinaso, estis la humila domo de la sinjorino Rosa, vidvino, maturaĝa kaj sen gefiloj. Sia humila loĝejo estis deviga haltejo por mulistoj kaj vojaĝantoj, kiuj pasis tiun solan vojon, mallarĝa kaj limita de abismoj. Per vendado de manĝaĵoj al vojaĝantoj kaj de paŝto por la bestoj, ŝi malfacile subtenis sian maljunecon.

La domo havis grandan koridoron kie oni surmetis la pakegojn da komercaĵoj malŝarĝitaj el la muloj por pasi la nokton post laciga labortago. En malsamaj lukoj pendigis la mulistoj siajn hamakojn kaj komencis daŭrajn konversaciojn ĝis fali de laco kaj dormemo.

Inter la koridoro kaj la vojo estis muro de kalko kaj ŝtonetoj, sur kiu sinjorino Rosa pendis strangan ŝtonon, granda kiel futbala pilko sed konkava, ŝi uzis ĝin por meti sufiĉan akvon por ke la kokoj iru trinki.

Ĉiu persono kiu tranoktis en la domo aŭ kiu pasis la vojon, sentis admiron kaj scivolon post vidi la ŝtonon. Oni petadis ĝin al sinjorino Rosa kiel donaco, aŭ oni eĉ ofertis monon pro ĝi. Sed, la respondo ĉiam estis la sama: "tiun ŝtonon mi nek regalias nek vendas".

Pri ĝia origino, ŝi rakontis ke ĝi falis el abismo proksime al ŝia domo, dum pluvego, ŝi vidis ke ĝi elstaris inter la aliaj ŝtonoj kaj la blanka sablo disĵetita, ĝi plaĉis al ŝi tiel, ke ŝi kunportis ĝin al sia domo sed malfacile.

Un buen día pasó por el sitio un italiano, de esos que habían salido de su país debido a la primera Guerra Mundial. La mayoría de ellos eran comerciantes, recorrían pueblos y caseríos vendiendo ropa, zapatos, correas, carteras y todo tipo de mercancía. Como el resto de los viajeros, el extranjero quedó deslumbrado cuando vio la piedra. No tardó mucho tiempo para buscar la manera de adquirirla. Utilizó sus diferentes estrategias de negociante, pero la respuesta de la anciana fue la misma que le daba a los demás: "esa piedra no la vendo, no la regalo, ni nada".

El italiano tendió su hamaca y pasó la noche en el corredor de la casa como el resto de los viajeros. Al día siguiente le dio un buen dinero a la señora por las comidas y el hospedaje y decidió retirarse, no sin antes volverle a insistir sobre la piedra. La respuesta no fue diferente. Entonces decidió hacer el último intento, sacó toda la mercancía que llevaba, la colocó encima del sardinel y le dijo:

--Todo esto es suyo si me deja la piedra--.

Doña Rosa quedó ofuscada con todo lo que le ofrecía el extranjero. Miraba cada prenda, muchas de ellas no las había visto nunca. Se quedó por un rato callada, estaba segura que aquello era una broma, no era posible que el hombre cambiara todas esas cosas, que seguro valían un dineral, por una simple piedra donde bebían agua sus gallinas.

-- ¡Está bien, se la cambio!--, expresó sonriente doña Rosa, esperando que el hombre le dijera que todo era una broma.

Pero, el extranjero, callado y con cara de contento, dobló la ropa, tomó el resto de la mercancía y ordenadamente colocó todo en la maleta que llevaba consigo.

--Aquí tiene señora--, le dijo, a medida que le alargaba la maleta.

lam pasis sur la loko italulo, el tiuj kiuj migris el sia lando pro la unua mondmilito. La plimulto el ili estis komercantoj, kiuj trairis la vilaĝojn kaj domarojn vendante vestojn, ŝuojn, zonojn, biletujojn, kaj ĉian artiklon. Same kiel la aliaj la fremdulo estis mirblindigita post vidi la ŝtonon. Li tuj serĉis la manieron atingi ĝin. Li uzis siajn malsamajn komercajn ruzaĵojn, sed la respondo de la maljunulino estis la sama kiun ŝi donis al la aliaj: "tiun ŝtonon mi nek regalas nek vendas".

La fremdulo etendis sian hamakon kaj tranoktis en la koridoro de la domo same kiel la aliaj vojaĝantoj. La sekvanta tago li donis bonan pagon al la sinjorino por la manĝaĵoj kaj la gastado, poste li decidis foriri, sed unue denove li petis vendi la ŝtonon. La respondo ne estis malsama. Li finfine decidis fari la lastan provon, li formetis ĉiujn varojn sur brik-aranĝon kaj li diris al ŝi:

-Ĉio estas via se vi donas al mi la ŝtonon.

Sinjirino Rosa ricevis grandan impreson pro ĉio kion la fremdulo ofertis. Ŝi vidis chiun vestaĵon, multajn ŝi neniam vidis. Ŝi daŭre silentis, ŝi certis ke tio estis ŝerco, por ŝi ne eblis ke li volis ŝanĝi ĉion, certe tre multekostaj aĵoj, nur kontraŭ simpla ŝtono sur kiu trinkis akvon la kokoj.

-Bone!, mi ŝanĝos ĝin!, diris sinjorino Rosa kun rideto, atendente ke la viro diru ke tio ja estis ŝerco.

Sed, la fremdulo silentis kaj faldis la vestaĵojn, prenis la aliajn varojn kaj orde metis ĉion en valizo kiun li kunportis.

-Jen ĝi sinjorino, li diris al ŝi, dum li etendis la valizon.

Cuando doña Rosa la tomó y se dirigió llena de alegría a guardarla en su cuarto, el extranjero agarró la piedra, se despidió en voz alta y siguió su camino.

Años más tarde, un viajero que pasaba por allí por primera vez, pero que ya sabía la historia de la piedra, le preguntó a la anciana por la misma. Ella le hizo la referencia sobre la venta. El hombre le dijo:

--Doña Rosa, pero, ¿qué era lo que tenía de especial esa piedra que todo el mundo la quería y ese musiú dio todo lo que llevaba encima para adquirirla?--

--Alumbraba de noche--, le respondió.

Kiam la sinjorino Rosa prenis la valizon kun ĝojo por gardi ĝin en la ĉambro, la fremdulo prenis la ŝtonon, adiaŭis laŭte kaj sekvis sian vojon.

Post kelkaj jaroj vojagxanto kiu pasis unuafoje la domon, sed li jam sciis la rakonton de la ŝtono, li demandis al la maljunulino pri ĝi. Ŝi parolis pri la vendo. La viro diris:

-Sinjorino, sed kion specialan havis tiu ŝtono pro tio ke ĉiu volis havi ĝin, kaj tiu fremdulo donis cxion kion li kunportis por akiri ĝin?

-Ĝi brilis nokte, ŝi respondis.



Ĉi tiu rakonto estis verkita de Rafael Ramón Santiago en la libro "Mitos y leyendas del páramo merideño" kaj tradukita en Esperanto de lia filo Isaac Santiago.



Tipa pejzaĝo en la andaj vilaĝoj.

Sen Eliro

Alicia Chilifoni

Mi ne estas via proprajo! Mi apartenas al neniuj! Lasu min esti. Mi ne bezonas vian aprobon por farti bone. Ĉu vi kredas tion, ke vi rajtas decidi pri mia vivo nure ĉar vi alportis min en la mondon? ĉar vi donis al mi vivon vi rajtas decidi pri miloj da aferoj kiujn ĝi enhavas? Mi ne elektis porti vian sangon! Alvenas situacio en kiu oni sentas pli familie al homoj kiujn ni konas ekster hejme ol tiujn de la propra biologia familio. Mi preferas loĝi ĉe la strato kiel almozulo anstataŭ esti daŭre humiligita de vi pro mono aŭ manĝaĵo, kaŭze de lito aŭ toloj kiuj min kovras. Mi preferas sur stratoj peti panon, monerojn, dormi sur la planko aŭ la herbo kaj rezignaciigi per kelkaj ĉifonoj. Kvankam amaso da homoj kredas ke tio estas kiel iri en inferon aŭ memmortigi, mi preferas eniri en tiu infero aŭ morti ol esti humiligita pro banalaĵoj. Sed,...kio okazas kiam filo aŭ filino decidas esti pli da tempo en iu ajn loko ol hejme? Nur tiam, siaj gepatroj memoras ke ili estas gepatroj. Sed,... kial? Eble ĉar vi interesigis ilin vere aŭ pro la najbara parolado? "la filo je X estas multa tempo eksteren, komencas ĉirkaŭadi malbonaj rumoroj.

Tiam la gepatroj eksentas malbone kiam estas konsideritaj malbonaj gepatroj, kaj ili subite eliras kurantaj preni vin. Sed kiam ŝajnas ke ili lernis la lecionon, la tuta historio denove komencas, unu kaj alia fojo... Se vi invitas viajn amikojn vidi filmon, ili diras "ĉi tio ne estas kinejo". Se ni uzas komputilon, "ĉi tio ne estas ciberejo", se oni ludas muzikon, "ĉi tio ne estas esejo". Se vi ĝuas vian tempon kun amikoj, tio ĝenas. Se vi drinkiĝas aŭ drogiĝas ĉe stratangulo, tio ankaŭ ne ŝatas. Fine, ili volas vidi vin sola fronte de televidilo aŭ komputilo, SOLA kaj MALLIBERIGITA.

Verkita de Joel, 20 jara amiketo, kiu donis al mi la rakonton intence oni konu ĝin. Ne havanta titolon mi decidis nomigi ĝin Sen Eliro. Post kelkaj monatoj Joel trovos eliron, la plej malbonan. Li memmortigis sub trajno. Nun mi pensas estas grava publikigi la rakonton por plej bone koni junulajn sentojn parte de la plenkreskuloj.

Alico el Mirlando



Ne diru

Carlos David Alvarez Pérez

Almenaŭ lasu diri al vi, ke
 Apenaŭ povas pripensi ion ajn kiam mi vidas vin.
 Malgraŭ vi ne plaĉas al mi,
 Ankoraŭ mi pensas pri vi kaj mi
 Ambaŭ marŝante sur la strato prenatataj per la manoj
 Preskaŭ mi ne povas rezisti la emocion esti kun vi.
 Anstataŭ ekkuri, ni parolu
 Aŭ promenu sub la krepusko.
 Kvazaŭ superhomo mi volas traflugi la tutan mondon kun vi.
 Ne iru...Se vi iros, ne diru...



Adiaŭ

Monologo

Samuel Rondón

(Li diras dum portas biskvitojn kontraŭ li mem) Kiaj bongustaj estas la biskvitoj, ja mi amas ilin, ili estas la unika afero, kiu trankviligas min, la unika afero, kiu sentigas min feliĉa... (Li ridas kaj mordas la biskvitojn) Mi ne scias kion mi farus sen ili, eble simple mi estus mortiginta al ĉiuj jam. Ĉu ne estas tiel, Marilu? (Li rigardas la pupinon sur la seĝo, li ridas). Mia pacienco por ĉiuj estas tre mallonga. Ĉu vi memoras kion mi faris al vi? (Li ridas)... Merdo, silentu, putino! (Li krias, li kaptas la pupinon kaj li ĵetas ĝin malproksime) Diable! Mi parolas al malbenata pupino! Al la malbenata pupino de tiu putino! Trankviliĝu, trankviliĝu (Li diras nerva), ĉio estos bone (Li finmanĝas la biskvitojn), post ĉio, ŝi estas morta kaj enterigata (Li ridas). Ŝi ne povas refari al mi la aferojn kiujn ŝi faris al mi, jam ne, neniam plu (Li sidiĝas sur la seĝo kie estis la pupino). Ĉu eble mankas ŝraŭbo en mia kapo kiel la homoj diras? (Enpenso) Ne, mi ne kredas ĝin (Li ridas), mi estas normala homo kun necesaĵoj normalaj, sole, mi ne ŝatas plenumi la parametrojn kreitajn pro la fava kaj putra socio! (Li krias). Multe da ili fundamentitaj en la religia fanatikeco (Li riras), Marilu, putino! (Li prenas la pupinon kaj li rigardas ĝiajn okulojn) Ĉu vi kredas ke mi estas freneza?! (Li demandas nerva) Kiel? (Li delasas ĝin) Damne! (Li ĵetas la seĝon. Li ridas) Definitive, ĉi tiu pupino elĉerpos al mi (Li metas plenan biskvitojn en sia buŝo). Kie estas mia tranĉilo?! (Li iras furioze al la tablo kaj li kaptas la tranĉilon)... Kion faras mi?

Mi perdis la kontrolon sur mi mem (Li spiregas, kuŝiĝas sur la planko). Kiu merdo okazis al mi? (Ploras) Nenio estas kiel antaŭ jam, ne estas kaŭzoj por rideti... (Li ridas) Krome la kontentiĝon kiu donis al mi vidi al la putino supliki kompaton! Povreta. "Ne faru damaĝon al mi, lasu min vivi" (Li diras en burleska tono. Li ridas). Mi memoras la feliĉon kiun mi sentis pro aŭskulti tiujn vortojn (Li ridas), sed mi bedaŭras nenion, post ĉio, ŝi mortigis min antaŭ, ŝi vundis mian koreton kun frata ponardo. (Li plendas) Tiunokte en la foiro mi aĉetis roz-faskon por ŝi, sed mi perdis ŝin de vido, post kelke da horoj, mi vidis ŝin, kisanta lin, al mia frato, mia plej kara amiko, (Li ploras) Tiuj gemalbenituloj havis merititan morton! Sed jam ili estas en la tombo (Li ridas), malfeliĉe tio ne trankviligas min tute (Li malfermas biskvitejon), la obskuraj fantomoj de ilia memoro persekutas al mi (Li manĝas biskvitojn), sed, kion oni povas fari? Mi faris al ili favoron. Mi, sola en ĉi tiu domo uzanta mian monon por biskvitoj kaj ili flamiĝanta en la fajro de la infero, sed kune (Li ridas).

FINO



Directorio de Asociaciones en América

El Movimiento Esperantista (la *Movado*) es muy amplio y diverso. En todo el mundo hay una variedad de clubes, organizaciones, asociaciones, editoriales, institutos, etc, dedicados a la difusión y el uso del idioma internacional Esperanto. En este directorio te mostramos las páginas oficiales de las principales asociaciones de Esperanto en América. Presta especial atención a las páginas y recursos de asociaciones en países de habla hispana, puesto que podrás aprovechar tu lengua materna (el español), para aprender Esperanto o para participar en los eventos y encuentros en todo el continente.

CANADÁ

Esperanto en Canadá: <http://www.esperanto.ca/>

Esperanto-Societo Kebekia: <http://www.esperanto.qc.ca/eo>

Boletín *La Riverego*: <http://www.esperanto.qc.ca/eo/riverego>

ESTADOS UNIDOS DE NORTEAMÉRICA

Esperanto-USA: <http://www.esperanto-usa.org/>

Usona Esperantisto, boletín de Esperanto-USA:

<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

Sociedad Esperantista de Washington: <http://www.esperantodc.net/>

Sociedad Esperantista de New York: <http://www.esperanto-nyc.org/>

Esperantic Studies Foundation: <http://esperantic.org/en/>

Editorial *Mondial*: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

CUBA

Asociación Cubana de Esperanto: <http://www.esperanto.cult.cu/>

Radio Havano Kubo: <http://www.radiohc.cu/eo/>

VENEZUELA

Asociación Venezolana de Esperanto:

<http://www.esperanto-venezuela.org>

<https://esperantovenezuela.weebly.com/>

BRASIL

Brazila Esperanto-Ligo: <http://esperanto.org.br/bel/>

Brazila Esperantista Junulara Organizo: <http://bejo.esperanto.org.br/>

Esperanto @ Brazilo (portugués): <http://esperanto.brazilo.org/wp2/>

Esperanto Ilustrado (portugués) :

<http://www.esperantoilustrado.blogspot.com.br/>

Esperanto Ilustrita (esperanto):

<http://www.esperantoilustrita.blogspot.com.br/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo: <http://easp.org.br/portal/>

URUGUAY

Urugvaja Esperanto-Societo: <http://www.esperanto.org.uy/>

ARGENTINA

Liga Argentina de Esperanto: <http://www.esperanto.org.ar/>

Blog de la Liga: <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/>

Bonaera Esperanto-Asocio: <http://esperanto-bea.blogspot.com/>

MÉXICO

Federación Mexicana de Esperanto:

<http://esperanto-mexico.org/>

Revista *Ni ĉiuj*:

<http://esperanto-mexico.org/es/nicxiuj>

Asociación Mexicana de Esperanto:

http://meksikoesperanto.org/el_esperanto_en_mexico.htm

COLOMBIA

Liga Colombiana de Esperanto:

<http://www.oocities.org/kolombio/>

Kolombia Esperanto-Ligo:

<http://esperantokalio.blogspot.com/>

CHILE

Asociación Chilena de Esperanto:

<http://esperanto.cl/>

Juventud Esperantista Chilena:

<http://chejo.blogspot.com>



Esperanto: Movimiento Internacional

El Movimiento Esperantista es un movimiento verdaderamente internacional, multicultural, que reúne en un solo esfuerzo muchas culturas, pueblos y naciones, sin discriminación de razas, idiomas, religiones o inclinaciones políticas. Esperanto significa idioma pero también significa cultura internacional, derechos humanos, democracia y justicia social. Todas las asociaciones y hablantes del idioma internacional tienen un centro común, la Asociación Universal de Esperanto, que organiza, entre otras cosas, los Congresos Universales de Esperanto que se llevan a cabo en una ciudad del mundo una vez cada año.

En España

ASOCIACIÓN UNIVERSAL DE ESPERANTO y otras organizaciones esperantistas

Asociación Universal de Esperanto (UEA):

<http://www.uea.org/info/hispana.htm>

UEA en Facebook:

<https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

Centro multilingüe sobre el Esperanto: <http://esperanto.net/>

Unión Europea de Esperanto: <http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Liga Internacional de Pedagogos Esperantistas:

<http://www.ilei-mondo.info/page.php?pid=6565769>

edukado.net: <http://edukado.net/>

Academia Internacional de las Ciencias San Marino:

<http://www.ais-sanmarino.org/index.htm>

Asociación Mundial Anacional: <http://www.satesperanto.org/>

Academia de Esperanto: <http://www.akademio-de-esperanto.org>

Federación Española de Esperanto:

<http://www.esperanto.es/hef/>

Hispana Esperantista Junulara Societo:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/hejs>

Asociación Catalana de Esperanto:

<http://www.esperanto.cat/web/?lang=ca>

Kataluna Esperanto-Junularo:

<http://esperanto.cat/kej/ca>

Kataluna Esperantisto (revista):

<http://www.esperanto.cat/web/KatalunaEsperantisto?lang=ca>

Arunda Esperanto-klubo:

<http://esperantoarunda.blogspot.com/p/eventos-eventoj.html>

Asociación Andaluza de Esperanto:

<http://andaluciaesperanto.blogspot.com/>

Radios y podcasts

Radio Vatikana (Ciudad Vaticano):

<http://www.radiovaticana.va/esp/index.asp>

Radio Havano Kubo (Cuba): <http://www.radiohc.cu/eo/>

Muzaiko (Internacional): <http://muzaiko.info/>

Pola retradio (Polonia): <http://pola-retradio.org/>

Kern.punkto (Alemania): <http://kern.punkto.info/>

Peranto (Alemania): <http://members.aon.at/aldone/retradio/>

3ZZZ Radio en Esperanto (Australia):

<http://melburno.org.au/3ZZZradio/>

Varsovia Vento (Polonia): <http://www.podkasto.net/>

Periódicos y revistas en línea

Revista Kontakto (revista juvenil): <http://kontakto.tejo.org/>

Eŭropa Bulteno (Boletín de Eŭropa Esperanto-Unio):

<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/>

La Ondo de Esperanto y editorial Sezonoj: <http://esperanto.org/Ondo/>

La Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/>

Le Monde diplomatique: <http://eo.mondediplo.com/>

La Esperanto-centro EVENTOJ: <http://www.eventoj.hu/>

La Esperanta Gazetejo: <http://www.gazetejo.org/gazetejo>

Ĉina Radio Internacia: <http://esperanto.cri.cn/>

El Popola Ĉinio (Desde la China del Pueblo):

<http://esperanto.china.org.cn/EL/EL/EIPopolaCxinio/>

Monato (actualidad, noticias y opinión): <http://monato.esperanto.be/>

Usona Esperantisto (Esperantista estadounidense):

<http://bulteno.esperanto-usa.org/>

Editoriales

Eldonejo Impeto: <http://impeto.trovu.com/>

Mondial: <http://sites.google.com/site/librojenesperanto/>

Flandra Esperanto-Ligo: <http://www.esperanto.be/fel/>

Kultura Kooperativo de Esperantistoj: <http://www.kke.org.br/>

Eldona Esperanto-Societo: <http://www.algonet.se/~eldona/>

KAVA-PECH: <http://www.kava-pech.cz/index-esperanto.html>

Libros de la serie Stafeto de Juan Régulo Pérez:

<http://www.esperanto.be/fel/but/stafeto.php>



Hazte miembro de nuestra asociación y ayúdanos a continuar nuestra labor...

Síguenos en nuestras redes sociales:

www.facebook.com/EsperantoVE

www.twitter.com/EsperantoVE


www.instagram.com/EsperantoVE

- Contribuyes en el fortalecimiento de la promoción y difusión del idioma en el país.
- Participas en cursos y talleres gratuitos.
- Puedes realizar préstamos circulantes de libros y material en Esperanto.
- Recibes descuentos en libros, encuentros, talleres, materiales y más.

También puedes ayudarnos con una donación a nombre de:

Asociación Venezolana de Esperanto (RIF: J-00187027-0)
Banco Banesco, Cuenta Corriente N^a 0134-0332-59-3321059219.

¡Todo aporte será profundamente agradecido!



VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Teléfono: 58 0212 6629224.
www.esperanto-venezuela.org
<https://esperantovenezuela.weebly.com/>
esperantoVE@gmail.com



Revista oficial de la Asociación Venezolana de Esperanto.